

La letero de l' *Akademio de Esperanto*

N-ro 27 : Aprilo – Majo – Junio 1994

ISSN 0986 - 1181



Ĉefartikolo

Kion anoncas unu hirundo?

Oni scias, ke unu hirundo ne sufiĉas por anonci printempon, tamen salutindas, ke la nova redaktoro de *Esperanto* kuraĝis aperigi "reagon" de bone konata aktivulino. Mi aludas pri Emilija Lapenna. Vi trovu reproduktion de ŝia letero al UEA sur la paĝo 8 de la nuna numero.

Nia Kroata Amikino kuraĝe revokis UEA-n al *socia disciplino!* Finfine ĉiu iom konanta nian historion scias, ke Zamenhof decidis starigi *Lingvan Komitaton*. Li efektive deziris ne plu arbitracii mem la lingvaj demandoj kaj, stariĝante tian kolektivian decido-centron, li antaŭvidis la momenton, kiam li retiriĝos de sia aktiveco! Ke necesas lingva kontrol-organo, multaj tion konscias!

Cetere la starigintoj de la moderna UEA tre atentis enmeti en la 4-an artikolon de la statuto de nia monda asocio frazon, kiu koncernas ĝiajn rilatojn kun la Akademio : per tio estis difinita la uzota lingvo. Eksplicite temas pri la Fundamenta lingvo kontrolita de la Akademio de Esperanto.

Kompreneble por ĉiuj, kiuj prenas Esperanton por ludilo, ne gravas, ke la Internacia Lingvo disponu pri norma listo de landnomoj. Sufiĉas al ili, ke la "oficialaj lingvoj" tian liston havu. Nu en la epoko kiam la Akademio prizorgis tiun demandon, pro la peto de iu nia korifeo ĉe la kapo de landa asocio, venis sub miajn okulojn similaj listoj en tri gravaj okcidentaj lingvoj : unue en la Franca, poste en la Germana kaj fine en la Angla! Mi estus preta veti, ke tiaj listoj ekzistas en multaj aliaj lingvoj. Niaj legantoj certe informos nin!

Nun oni vidas la fruktojn de la agado de la sorĉistaj lernantoj oficantaj ĉe la kapo de UEA. La "ĥaoso de landnomoj", kiu estis praktike sufokita dank'al la Akademia listo, reaperis malsama kiel fenikso el siaj cindroj. Efektive tra la breĉo fosita de la Koreanoj penetris kun la beno de UEA dekoj da novaj nomoj neniame antaŭe uzataj : unuj pli aberaciaj ol aliaj. Ne klaras, ĉu UEA allasis tiujn novajn nomojn por kvazaŭ kaŝi la fraŭdan kaj kontraŭstatutan akcepton de la unua el ili, aŭ ĉu tio fontis el la nepra deziro ludi kontraŭ la Akademion en la espero tirane regi ankaŭ sur la lingvo mem! Eble ankaŭ tio estas elemento en la fama kaj mistera "lingva politiko" de UEA.

Ĉiuokaze dankon al Emilija pro ŝia letero!

D-ro André ALBAULT



KRONIKO DE LA NUNTEMPO

CENTJARIĜOJ

1994 solenas pli ol unu centjariĝon . . .

*

Francio festas la 5-an centjariĝon pri la naskiĝo de Frato François (1494), iĝinta Majstro Rabelais, doktoro pri medicino, unu el la ĉefverkistoj en la beletra Franca lingvo de la XVI-a jarcento; alinome "Alicofribas Nasier" laŭ anagramo tirita el lia nomo, aŭtoro de "La tre honoriga vivo de l'granda Gargantua", kies ĉekapaj vortoj tekstas :

*Pli bone pri rid' ol pri larm' verki
pro tio, ke rid' 'stas propraj' de l'hom'.
Vivu ĝojaj!*

Kaj kiel ateste skribis *Victor Hugo*, lia ekrido estas "enorma"!

*

Sed la 8-an de Aprilo 1894 naskiĝis Raymond Schwartz, kiu – unika en la panteono de la Esperantaj beletristoj – adoptis la tradicion de F Villon, Cl. Marot kaj precipe François Rabelais, kiel kanzonisto kaj humoristo . . . El lia "Verdkata Testamento" de 1926 li jen postlasis al ni *Sub signo de Gaja Muzo* jenajn konsolajn konsilojn :

"TERMOMETROJ"

*Se vin mallaŭdas la kritiko,
Se vin atakas konkurenc',
Se kalumnias vin amiko,
Nu, ĝoju pri la konsekvenc',
Ĉar ĉio tio ja signifas,
Ke vi vivas!*



*Se bonon pri vi ĉiuj diras
Kaj nur parolas pri merit'
Se ĉiuj ŝajn-sincere miras :
"Ho kia viro! kia sprit'!"
Videble, oni florojn portis,
Ĉar vi mortis!*

Ho! Kiom aktualaj restas tiuj "termometroj" en nia satir-klaĉa nuntempo! . . . kies etoso jam de preskaŭ dudek jaroj neniel ŝanĝiĝis!

J. T.

SKRIBAS LEGANTOJ . . .

Mi proponas al la Akademio fari studon pri *ist / an / ul*. Laŭ mia opinio, la nuntempa uzo estas nacilingva kaj ne sufiĉe propra al Esperanto kaj logiko. Ekzemple :

Religianoj, ĉiam je *-ano* : *Kristano, Budhano, Kalvinano . . .* ne je *-isto*.

Politikisto, ĉiam je *-isto* : *Stalinisto, dekstristo, livisto, Trockiisto . . .* sed ne *dekstrulo*.

Klara diferenco inter *ano* kaj *isto* : *Hitleristo* ne estas *Hitlerano*, *tenisisto* ne estas *tenisano*, *futbalano* ne estas *futbalisto*, *Esperantano* ne estas *Esperantisto*. Ĉu veras, ke *-isto* = *-ismano*? Ni legu la rimarkojn sub la PIV-aj kapvortoj *-an/ kaj -ist/*.

C. J. G.

(Paderborn)

Ndir - *Interesa demando transdonita al la Vortara Sekcio de la Akademio.*

*

Ĉu estas vere, ke telefone (por eviti miskompreniĝon) oni rajtas uzi kaj ja fakte uzas la numeralon *sis* anstataŭ *ses*?

C. J. G.

(Paderborn)

Ndir - *Ŝajne tio estis unu el la proponoj de inĝeniero Roelofs okaze de la iama "Fonetika Eksperimento de Radio Roma", pri kiu li aperigis detalan raporton kun komentoj en "Scienca Revuo" tiam sub lia redaktoreco. Sekvis nenio. Necesos do atendi ĝis Esperanto ne plu estos "ludilo" sed male estos ĉiutage serioze uzata en, ekz-e, komerca telefonado por ekscii pri pravo aŭ pri senutilo de la propono. (A. A.)*

*

Kiam ni lastfoje renkontiĝis, mi metis la demandon, ĉu formoj, kiaj *mi devintus* aŭ *ni povintus*, estas gramatike korektaj.

Mi diris, ke Zamenhof pritraktis ĉi tiun temon en la "Lingvaj Respondoj". Li skribis, ke la finaĵoj *-is, -as* ktp ne signifas *estis, estas . . .*

Beli ne signifas *esti bela* kaj *marteli* ne signifas *esti martelo*, ĉar la finaĵo *-i* esprimas agon. Kiu aktoras povas esti ne-aktoro. Aliflanke, kiu estas aktoro, povas provizore ne aktori . . . Cetere se oni referencas al la teorio de la vortfarado laŭ Kalocsay, montriĝas, ke *marteli* estas analizebla kiel *i martele* kaj *beli* - kiel *i bele*.

Kial do *venkinti* ne estas analizebla, kiel *i venkinta, agi kiel venkinto*? Ĉu



al Perla Martinelli

pri la agnosko de Esperanto kiel

literatura lingvo en la PEN-asocioj

Perla Martinelli, post la forpaso de nia bedaŭrata Gaston Waringhien vi estas la sola Akademiano samtempe membro de Esperanta PEN-Centro. Kiom grava vi taksas, por la AdE, la akcepton de tiu ĉi nova centro en la tutmondan familion de PEN-Klubo Internacia?

La 10-an de Septembro 1993, en Santiago de Kompostelo, Esperanto estis agnoskita kiel literatura lingvo fare de la plej grava literaturista instanco en la mondo. Pri tio jam informis interalie Heroldo, Esperanto de UEA kaj, tre detale, Literatura Foiro, kies ĉefredaktoro ĉeestis la PEN-Kongreson*. Mi opinias, ke tiu agnosko signifas unuavice, ke nia parolkomunumo estas konsiderata kiel necesa kaj sufiĉa socia portanto por la lingvo Esperanto. Ne ĉiuj Akademianoj



(Skribas legantoj : fino)

iu, kiu venkintas ne estas homo, kiu kondukas kiel venkinto, fanfaronante pri siaj sukcesoj kaj atendante laŭrojn kaj laŭdojn?

D. C.

(Ecquevilly, F)

NdIR – Jen efektive demando, pri kiu oni ne sufiĉe atentis : tamen la nuancoj gravas en lingvo; ne sufiĉas diri kiel Julio Cezaro : mi venis, vidis, venkis! . . .

*

Mi petas vin klarigi, ĉu oni prononcas *Eŭropa*, por la *eŭ* per du, aŭ per unu sono! La Esperantistoj faras la supersignon, sed prononcas *eu* per du sonoj. Ĉu tio estas ĝusta?

I. Sandner

(Vieno, A)

NdIR – Tio estas nova demando : ekzistas homoj, kiuj kutimas pri diftongoj kaj aliaj, kiuj tute ne konas tion, same kiel estas homoj, kiuj konas nazalajn kaj aliajn tute ne. La demando postulas al kutimiĝadon!

(Literatura lingvo : fino)

rilatas al nia idiomo kun la sama (mikro)socia konscio : kelkaj kondutas kvazaŭ ĝi estus kabineta ludilo aŭ esotera alĥemio, sen rekta rilato kun la vivanta parolantaro^{***}. Post Santiago estas evidente, ke la makrosocio komprenis kaj respektas la ekziston de popolo, kiel ajn disa, kiu rajtas je propra lingvo : tial la tuta Akademio devus esti pli atenta al la dialektika rilato inter la lingvo kaj ĝia socia portanto.

En la statuto de la Esperanta PEN-Centro estas eksplicita aludo al la Manifesto de Raŭmo : kion tio signifas?

Efektive, la kvara alineo de la punkto 2 (Celoj), tekstas : (La Centro intencas) *firmigi ĉe siaj membroj la konscion aparteni al unika komunumo, kvazaŭ al memelektita diaspora lingva minoritato (Manifesto de Raŭmo) kaj konsekvence uzi Esperanton ne kiel internacian helplingvon sed kiel transnacion ĉeflingvon.*

Por la Raŭmistoj gravas du principoj, kondenseblaj kvazaŭ en du sloganoj : "ĉiu verkisto rajtas esprimi sin en la preferata lingvo" – "ne mia nacio estas mia lingvo, sed mia lingvo estas mia nacio". Interese, ke Sud-Amerika verkistino diris precize la duan frazon en interveno dum la kongresaj diskutoj, tute ne konante nian opinion. Pri la unua principo ĉiuj PEN-delegitoj konkordis, kun diversaj nuancoj; plej konscie kaj konvinke tiuj, por kiuj arto, kaj ne unuavice mono, estas la celo de aŭtenta verkisto.

Se mi bone komprenas, la kerno de la Raŭma novaĵo estas en la lingvo-koncepto . . .

Vi pravas. Kaj tiu ĉi estas ĝenerala demando ankaŭ interne de nia Akademio, kie kunvivas profunde malsimilaj vidpunktoj^{***}. Mi opinias, ke la Kolokvo en Prago estas taŭga okazo por konfronti tiujn vidpunktojn. Kaj en tiu ĉi libera konfrontiĝo mi vidas la ŝancon por aktuala rolo de la Akademio en nia parolkomunumo : neŭtrala forumo por enfokusigi la diversajn lingvokonceptojn ene de Esperantio. Laŭ mi, la lingva stabileco dependas ne de specifaj leksikologiaj demandoj, sed ĝuste de la ekvilibro inter malsamaj lingvokonceptoj.

Dankon pro la intervjuo kaj ĝis la revido en Prago!

*) Nur pro materiaj motivoj, tiu intervjuo ne povis noti la prian ĉefartikolon de nia Prezidanto (La Letero n-ro 26).

**) Efektive aliaj protestas pri la "fetiĉismo" de la pretendita "lingvo-uzado", bone konsciante, ke tro multaj ankoraŭ nur lernas la lingvon. (A. A.)

***) Tute prave, ĉar multaj verkistoj enestas la AdE, kiuj ne estas PEN-membroj. Plie multaj aliaj laboras en sciencoj aŭ teknikoj kaj estus ofende diri al ili, ke ili tenas Esperanton por ludilo! Por ili scienco plej valoras. Sed ĉiuj estas respektindaj kaj respektendaj. (A. A.)

Nur simpla lingva afero!

La Redakcio de *La Letero* ricevis okaze de mia ĉefartikolo pri "antiuniversalismo" (n-ro 25), plenmanon da reagaj leteroj. Ili fakte temis pri la landnomoj, tamen tro traktita demando laŭ diversaj korespondantoj. Du el la reagintoj proponis tute novajn sistemojn, sed tiuj dube utilis por nova lingvo-projekto kaj ili estas novaj nur en la okuloj de siaj aŭtoroj; nenio nova sub la suno! Ni do ĉi-sekve koncize donos respondon al la aliaj, kiuj levas interesajn demandojn kaj donis al ni la oportunojn precizigi kelkajn punktojn. Ĉiuj legantoj profitos el tio.

Sed finfine tio estas nur (simpla) lingva afero!

De Beverling : *La komparo kun Nederlandanoj kontraste kun Frisoj estas tute sen-senca : Nederlando estas lando, ne nacieco. En tiu ĉi mia lando vivas kaj loĝas homoj de diversaj devenoj, jam de jarcento. Eksterlande oni ĉiam citas pri Frisoj kaj prave : Frisoj estas Frisoj, kaj, kiom ili loĝas en Nederlando, ili estas samtempe Nederlandanoj, kompreneble! Sed ankaŭ Brabantanoj, kiuj montras minimume samfortan propran identecon interne de nia lando, estas Nederlandanoj, almenaŭ – denove – kiom ili loĝas en Nederlando!*

Tio estas klarigoj, kiuj dronigas simplan *lingvan* aferon! Cetere, jen alia letero . . .

De Broadribb : Post longa kaj konvinka letero, li certe pravus konkludi, ke la vortoj *etno, gento, ŝtato, lando, nacio* ktp estas komprenataj tra la mondo tre diversmaniere! Ili do havas mondscale tre komplikajn semantikon. Certe estus ambigue difini per unu el tiuj vortoj la landnomojn je *-io* aŭ sen *-io* kaj la nomojn de iliaj anoj je *-ano* aŭ sen *-ano*.

La tuta afero estas pri la signifo de *-ano*! Tiu sufikso neniel signifas *loĝanto* kaj nur la deziro doni rapidan difinon klarigas la uzon de tiu vorto en iuj vortaroj. Tiel same *-io* ne ĝuste signifas *lando*. La sufikso *-ano* nur montras reciprokan apartenecon : la anoj apartenas al difinita teritorio kaj tiu teritorio apartenas al ili; anoj de *Francio* estas *Francoj*; la teritorio propra al Francoj *nomiĝas* Francio. Cetere tiu "aparteneco" estas pure lingva nocio, utila por klarigi la signifon de la diversaj nomoj.

Tion saman oni povas eldiri por ĉiaj teritorioj, ankaŭ por *Nederlando* kaj por ĉiu alia teritorio, kiu hazarde ne finiĝas per la sufikso *-io* : la afero estas pure lingva! Sed *Franco* povas samtempe esti *Okcitano* (el unu el la ses provincoj de Okcitanio : nome, el Limoĝio, Aŭvernjo, Gavotino, Gaskonio, Langvedoko, Provenco, . . .), aŭ esti *Bretono, Flandro, Alzacano, Lorenano* aŭ *Campanjano*, ktp. Versajne eblas ion similan listigi por plimulto de teritorioj! Ni rimarku, ke ankaŭ ĉi tie la uzo aŭ la ne-uzo de la sufikso *-io* aŭ de la sufikso *-ano* havas neniun esencan valoron! Kaj, ekz-e, oni parolas pri *Flandrio* sed pri *Alzaco*; pri *Gaskono* sed pri *Provencano* aŭ ankaŭ pri *Gaskono*, sed pri *Aŭvernjo-ano*!

Certe troviĝos homoj, kiuj plendos pri la (tre relativa) komplikeco de la dukategoria listo. Eblas venki tiun komplikecon, nur se ĝeneraliĝos la sufikso *-ano*! Ekz-e, per uzo de *Gaskon-ano* anstataŭ *Gaskono*, *Flandr-ano* anstataŭ *Flandro*. Sed la Akademio ne opiniis, ke ĝi rajtas trudi tian ĝeneraligon! Ĝi – pli-malpli konscie – nur ebligis ĝin, dirante, ke, ekz-e, *Flandriano* kaj *Flandro* estas sinonimoj : vidu la 3-an Rekomendon pri Landnomoj (p. 49 de Aktoj III). Ĝi uzis aliajn ekzemplojn. Temas nur pri lingva afero!

Landnomo je *-io* signifas, ke aŭ tiuteritoria lingvo mem, aŭ iaforte la plimulto de aliteritoriaj lingvoj agnoskis propran nomon finiĝantan per *-io*, t.e. per ties ekvivalentoj en la diversaj lingvoj (*-ia, -ie, -ien, -ië, -ija, -iya* . . . kaj ankaŭ *-sko, -ska* . . .). Alidire la sufikso *-io* estas nomo per si mem; ĝi estas trovebla kiel tia en la diversaj lingvoj, sed iuj teritorioj surportas tiun nom-sufikson, aliaj – ne! Ekz-e, la Afrika *Tanzanio* (el *Tanganjiko* kaj *Zanzibaro*, plus la nomsufikso *-io*) kaj la Eŭropa *Beneluxo* (el *Belgio, Nederlando* kaj *Luksemburgo*, sed sen *-io*). Neniu rajtas interŝanĝi la lokon de la sufikso *-io*! Nomi teritorion ne estas ludo por kapricemaj infanoj, aŭ inĝeniaj Esp-istoj!

Tamen ekzistas aliaj finaĵoj, kiujn ni tolereme devas agnoski : la plej konata estas *-istano*. Se ĉiuj lingvoj nomas teritoriojn *Afgan-istano*, *Kurd-istano*, *Uzbek-istano* . . . , ne apartenas al ni, Esperantistoj, suverene kaj aŭtoritate transnomi ilin! Transnomi rajtas nur la popoloj kaj iliaj reprezentantoj; kvankam lastanalize la plimulto de la lingvoj decidas konservi malnovan nomon aŭ adopti la novan.

Nederlandano kaj Franco en Esperanto estas homoj, kiuj apartenas al difinitaj teritorioj. Nederlando kaj Francio estas teritorioj, kiuj apartenas al difinitaj homoj. Ĉio sub rezervo de eventualaj specialaj leĝoj. Neniu lingvo respondecas pri tiuj leĝoj, precipe ne Esperanto.

Nederlandano, Franco, kiuj *loĝas* en aliaj teritorioj ol la propra, estas loĝantoj de tiuj aliaj teritorioj, ili neniel estas ties anoj. Sub rezervo de la leĝoj aŭ eventuale de sia propra decido ili konservas sian leĝan statuson (naciecon, ktp) dum sia tuta vivo. Ili eventuale povas daŭre loĝi eksterlande. Tio ŝanĝas nur ilian adreson.

Iuj popoloj normale restadas (loĝas, nomadas, kampadas, . . .) en teritorioj, kie ili estas pli-malpli agnoskitaj. Tiel, ekzemple, Zamenhof deklaris sin "Ruslanda Hebreo". Oni eventuale povus paroli pri *Franclanda* persono : homo, kiu ne sukcesis aŭ ne deziris ricevi la Francan naciecon, civitanecon. Sed se li ricevas, li fariĝas *Franco* laŭleĝe. Tiel same pri Nederlando-landa homo. Sed se Franco iras kaj vivas en Nederlando, li ne fariĝas pro tio Nederlandano! Li ja estas kaj restas "Franco loĝanta en Nederlando". Aŭ ĉu Esperantistoj venintaj al la Kongreso en Roterdamo eble fariĝis "Nederlandanoj" dum unu semajno?

Tio estas do pure lingva demando, por kiu oni ne bezonas filozofadi, sed devas nur akcepti la signifon de la sufiksoj kaj aliaj elementoj.

De Canko Murgin. "La Letero de l' Akademio" estas ne ampleksa, sed laŭ mi, tre serioza. Ekde 1937 mi uzas la radikon : *Ukrajn-*, sed ne la *Rusismo : Ukrain-*. En Bulgara lingvo la radiko estas ankaŭ *Ukrajn-*. La tezo de A. Albault estas la vera kaj naturisma. La Akademio de Esperanto ne devas cedi al personaj plaĉoj kaj preferoj. Oni devas serĉi la Spiriton de Esperantaj deriv-principoj".

La AdE provis trovi la plej bonan kompromison inter la diversaj necesoj ofte kontraŭdiraj inter si : delonga ekzisto de iuj ne-taŭgaj nomoj, strukturo de Esperanto, klareco, internacieco kiu devigis nin preferi iujn nomojn antaŭ aliaj, ktp.

De Fernand Boyet. "Mi tute konsentas kun A. Albault, kiam li diras, ke nur la popoloj, laŭ politika vojo, povas difini sian nomon, kaj ke Esperantistoj ne rajtas trovi specialan esprimon malsimila de la laŭjura rekonata nomo."

Prave, sed verdire la afero estas tamen iom pli komplika. Ekz-e, la lando *Shqipëria* estas nomata de la plejmultaj lingvoj *Albania*, *Albanie*, *Albanien*, *Albanija*, *Albansko* ktp, sekve oni nomas ĝin en Esperanto ankaŭ *Albanio*, sed tute ne "Ŝkiperio", kiu estus nomo tute ne konata. La bazo de la Esperanto-nomo principe estas la nomo plej internacie konata.

Esceptoj troviĝas principe nur por la nomoj, kiuj ne havas unu internacian ekvivalenton; ekz-e, por *Japanio* ekzistas tri internaciaj formoj *Ĵapon-o*, *Ĵapon-io*, *Japan-o* kaj teorie oni devus preferi la kompromisan landnomon *Ĵapon-o*. Sed de longe la Esperantistoj pro hazardo unuanime preferis la plej maloftan strukturon (tiun de *Ĵapon-io* sed ne tiun de *Ĵapon-o* kaj de *Japan-o*), kaj la plej maloftan radikon (tiun de *Japan-o*, landnomo, sed ne tiun de *Ĵapon-o* kaj de *Ĵapon-io*). La Akademio ne povis starigi sufiĉajn motivojn por proponi *Ĵapono*. Ĝi nur indikis la iafoje uzatan sinonimon *Nipono*, kiu ekvivalentas al la Japana landnomo mem (*Nihon* aŭ *Nippon*) kaj prezentas iagradan internaciecon.

La kazo de *Germanio* estas iom alia. Ekzistas pluraj internaciecoj (*German-io*, *Aleman-io*, *Dojĉ-lando*, *Nemec-lando*, *Vokiet-io*, *Saks-o*) kaj eblus heziti almenaŭ inter la kvar unuaj. Sed feliĉe Zamenhof mem decidis por ni; kaj li decidis favore al la (ankaŭ) Latina formo. (Vidu : A. Albault, 1991 : "Mult-lingva Glosaro pri landnomoj").

SOCIA DISCIPLINO

En 1989 la Akademio de Esperanto aprobis liston de lando-nomoj, kiuj devas esti konsiderataj oficialaj kaj normaj formoj. En tiu listo la kongres-lando por 1994 estas "Koreo".

Mi ofte legis en la Korea revuo *La espero* diskutojn pri la formo de tiu lando-nomo. Siajn argumentojn prezentis pluraj elstaraj Koreaj E-istoj, inter kiuj ankaŭ la nuna UEA-estrarano prof. So Gilsu. Ili argumentis por "Koreio" aŭ "Koreujo", nur ne "Koreo". Mi ne komprenis tiujn argumentojn, kvankam mi atenteme legis.

Fine mi konstatis, ke temas pri neskribita subkompreno, proksimume tiel: Ĉinio kaj Japanio finiĝas je "-io" (aŭ iom arkaike je "-ujo"), do ne dignas, ke Koreo ne havu la saman finaĵon. Por mi tio estas neakceptebla, ĉar la digno de la lando ne fontas el ĝia lingva formo, sed el la situacio, kiun tiu lando ĝuas en la mondo.

Se la Akademio aprobis liston de lando-nomoj, la movado tion devas respekti. La Akademio ne havas kanonojn por defendi sian decidon, sed la movado devus havi socian disciplinon kaj sekvi senescepte la proponon de sia plej altranga lingva instanco.

Emilija Lapenna
(Kroatio)

El "Esperanto", organo de UEA, Majo 1994, paĝo 93.

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO. Trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. — *Redaktoro* : Jean THIERRY. — *Direktoro de la publikaĵo* : André BOURDEAUX. — *Presejo* : COCONNIER, 72300 SABLÉ. — *C.P.P.* : n-ro 6971. — *Prezo* : 1 n-ro : 40 FRF — *Jara abono* : 120 FRF — *Pagebla* : ĉe kontoj : Banka : Crédit Lyonnais n-ro 7090 F — Poŝtĉeka : 735 27 B Paris. — UEA : Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝirofiĉejo Den Haag) : nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto" (40 gld).

Perantoj por diversaj landoj :

Aŭstralio : Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRAVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta) : S-ro UMEDA Yosimi, LEO.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Benelukso : Eldonejo kaj Librejo SONOPRILO. Doornstraat 22,

Brazilo : Brazila Esperanto-Ligo : ScS Ed Jockey Club — Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio : S-ro Claus J. GÜNKEL, Killianstr. 18, D 33098 PADERBORN, Germanio. — Poŝtgiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301 (36 DM).

Kubo : S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko : S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DF, Meksiko.

Rusio : D-ro Sergey N. KUZNETSOV, Semashko 1/12 RUS 103009 MOSKVO.

Svedio : Sveda Esperanta Federacio : c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono : Eldonejo Bero : RO.Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono (23 \$).